Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso:
Wien, I., Neue Burg,
Telefono R-27-803

Manuskriptoj
kaj resendotaj kontraŭ
reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono
komencebla ĉiumonate
por Aŭstria S 4.60,
pagebla ankaŭ en part-
pagoj (½ j. S 2.35),
aliaj landoj svfr. 4.25
(9 poŝtrespondkuponoj)
Ponumere 45 g (1 prk).
Poŝtŝparkaso-konto
aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 3 (140) Korneuburg ĉe Wien, la 5. marto 1937. 14. jaro

Esperanto en la moderna vivo.

Internacia Konferenco.

Paris, 14. ĝis 17. majo 1937

Protektoro la Statprezidanto Lebrun

16 Ministroj en Honora Komitato

210 personoj jam aliĝis. La kotizo restos fixita je 80 fr. fr. kaj 60 por familianoj ĝis 1. marto.

Aŭstrianoj povos ankaŭ anonci sin al Int. Esp.-Muzeo.

1. komisiono: Esp. en la lernejoj

La antaŭaj Konferencoj (Genève 1922, Nice 1934) starigis la sekvantajn konstatojn (a), kiujn ni devas rigardi definitive akiritaj.

A. **Utileco de E.-instruado en la lernejoj.**

a) E. bonega rimedo por plibonigi la konon de l' gepatra lingvo: estante „la gramatiko senti“ kaj distingante per siaj finiĝoj la grama-ikajn kategoriojn, kiujn ĝi tiel igas konkrete videblaj, ĝi povas multe utili al la infanoj en la gramatika studo de ilia propra lingvo — precipe, kiam temas pri lingvoj kiel la angla aŭ franca, kie la gramatikaj rilatoj inter la vortoj malofte esprimiĝas per forŝanĝiĝo. Alie per la logikeco kaj la fekundeco de ĝia sistemo de vortfarado, ĝi instigas la infanojn bone elekti siajn vortojn kaj pligrandigi la nombron de tiuj, kiujn ili efektive uzas. Instruistoj el plej diversaj landoj konfesas, ke E-studado videble progresigas la lernantojn en ortografio, gramatika analizo kaj vort-farado.

b) E. havas specialan valoron kiel bazo por poste fremdajn lingvojn: estante facile lernebla ĝi devigas al la lernantoj relative rapide atingi stadion, kie ili konscias pri la efektiva povo-stado de alia lingvo ol la sia, kie ili povas jam ŝati siajn konojn, t. e. stadion, kie ili kon-statas, ke la studo iĝas profita kaj interesa, do: ravaĝigo kaj plezuro en la laboro. Aliparte, per la lernantoj tiel atingas kun negranda peno la esencan rezulton, ke ili jam libere uzas la lingvon, t. e. evitas la heredajn, lingvajn aŭtomatismojn, kaj akiras aliajn, tial estas al ili multe pli facile eklerni novan lingvon, en kiu tiu komenca fortostreĉo ne estas farota. La studo de nova lingvo helpas en la studo de la sekvanta; estas do avantaĝo komenci per la plej facila.

c) Pro la preskaŭ tuja uzebleco por kore-spondado E. pligrandigas ĉe la lernantoj la ĝojon kaj guston pri geografio kaj historio, vekante la intereson al fremdaj popoloj, al iliaj landoj, arto, literaturo kaj ankaŭ al la ideo pri interpopola paco.

d) Fine ĉiuj fakuloj unuanime deklaras, ke per E. estas instruata de kompetentaj instru-antoj, ĝi allogas la infanojn pli ol iu ajn instru-objekto, kaj ke ili ĝoje kaj vigle dediĉas sin al la studado. Pli ol iu ajn lingvo E. pro sia simpleco taŭgas esti instruata rektmetode; pro sia logikeco ĝi tre frue donas al la infanoj la impreson, ke ili kreas libere siajn vortojn kaj frazojn kaj tiel partoprenas en la kurso aktive kaj ne pasive per simpla memor-streĉo; pro sia facileco E. donas al la lern-antoj per organizo de korespondado inter gelernantoj, la eblecon senpere atingi la real-aĵojn de la sociaj faktoj kaj de la moderna vivo.

B. **Praktika aranĝo de tiu instruado**

Laŭ la plej diversaj eksperimentoj estas kon-statite, ke necesas regula kurso dum du jaroj, po du horoj semajne (aŭ 1 jaro po 4 horoj), por ke eŭropaj geknaboj, 11- ĝis 14-jaraj, kiuj scipovas nur sian gepatran lingvon kapablu sufiĉe bone konversacii en E. pri temoj kon-formaj al ilia aĝo kaj flue legi librojn adaptitajn al ilia instrunivelo. De la fino de l' unua jaro ili kapablas konstrui frazojn en E., respektante la regulojn pri frazkonstruo kaj sintakso, kaj sekve korespondi kun eksterlando.

La prez. de Tutmonda Asocio de Geinstru-istoj Esp. (TAGE) entreprenis starigi statistikon pri la lernejoj, kie E. estas nun instruata, laŭlande. La organizado de la instruado diferenciĝas laŭ la landoj; tial nia demandaro temas pri tri gradoj:

Demandaro pri Unuagrada Instruado (por geknaboj inter 6 aŭ 7 kaj 12 aŭ 14 jaroj).

I. Ĉu la instruado estu enkondukota en ĉiujn lernejojn? Aŭ nur en certajn, tiujn de urboj, kie lernantoj pli ofte havas okazon utiligi ĝin (apudlimaj urboj, havenoj ktp.)?

II. Ĉu tiu instruado estu principe deviga aŭ laŭvola?

III. De kiu ĝi estus plenumota? Ĉu de instru-isto, de speciala fremdlingva instruisto aŭ de alilanda esperantisto?

IV. Kiam oni komencu la instruadon? Ĉu en la lasta lernejjaro aŭ en la du lastaj? Kiel post-lerneja instruado?

V. Kia metodo estu aplikata? Laŭ kia pro-gresigado?

VI. Kiaj estu la sankcioj? — 1. Ĉu speciala provo enkondukita en la finekzamenon? — 2. Ĉu aparta ekzameno kun difinita diplomo? — 3. Ĉu deviga provo en la ekzameno por enriri Duagradan Lernejon?

VII. 1. Kiel nuntempe trovi la por tiu ĉi instruado necesajn instruistojn? — 2. Kiel estonte organizi ilian formadon?

VIII. Kiamaniere ebligi al la lernantoj uzi E. post fino de la studoj?

IX. Personaj spertoj kaj sugestoj.

Demandaro pri Duagrada Instruado (geknaboj inter 11 aŭ 13 kaj 17 aŭ 19 jaroj; superaj popollernejoj, kolegioj, liceoj, meti-, komerc-lernejoj).

A. **Instruado pri ĝenerala kulturo**

I. Ĉu oni komencu la studadon de E. en la duagrada lernejo aŭ ĉu preferinde ĝin komenci ekde la unuagrada?

II. En la unua okazo: 1. En kiajn klasojn oni enkonduku E-on; en komencajn, mezajn aŭ

Brazila Ligo de Esperanto

en Rio de Janeiro sendis por niaj kolektoj vere unikan koverton de 9. Brazila Kongreso, afrankita per la ĝis nun en Brazilio eldonitaj 3 poŝtmarkoj kun Esperanto-teksto: Foiro 1935, Foiro 1936, Esp.-Kongreso 1936 kaj 700-jara memormarko kun kongres-stampo.

Koran dankon kaj gratulon pro ĉi tiuj suk-cesoj.

Ĉe Kardinalo d-ro Theodor Innitzer.

Ĉefepiskopo en Wien.

La 2. marto mi estis akceptita de lia eminenco en konate afabla maniero. Mi transdonis la duan numeron de Aŭstria Esperantisto kun la artikolo pri Episkopaj Diocesana Muzeo en Wien, la libron pri Somera Universitato kun ŝlosilo germana kaj vortareto de d-ro Pfeffer. La kardinalo, longjara amiko al Esperanto, kun granda danko akceptis la librojn kaj kun granda intereso aŭskultis mian raporton pri la okazonta Konferenco „Esperanto en la Moderna Vivo".

La aŭdienco daŭris ¾ horojn.

Steiner.

Jus aperis la bela grandformata broŝuro „Brasil Paiz de Turismo" en portugala lingvo, kiu publikigas la bildojn de kardinalo d-ro Innitzer kun mencio pri la farita meso dum 28-a kaj de episkopo d-ro Eltschkner-Praha.

---

finajn? — 2. Po kiom da horoj semajne? — 3. Laŭ kia metodo? — 4. Ĉu la instruado de E. estu kunligata kun tiu de la gepatra lingvo? Kun tiu de fremda? — 5. Kiel enkonduki tiun pluan studadon sen superŝarĝo de la studprogramoj?

III. En la dua kazo: kiaj rimedoj necesas, por konservi la E.-konojn, akiritajn dum unuagrada lernado, kaj ilin pligrandigi sen troa ampleksigo de la programoj?

IV. Ĉu apartaj sankcioj por tiu instruado necesos? Kiaj? — 1. Ĉu apartaj provoj enkondukotaj en finekzamenon de la duagrada lernado? — 2. Ĉu aparta ekzameno, kiun oni povus lokigi en la daŭro de tiu duagrada lernado?

V. Kiaj estu la avantaĝoj el tiuj diplomoj? — 1. Ĉu ili estus necesaj por eniri la trian gradon de la instruado? — 2. Aŭ por plenumi iujn ekzamenojn kaj kiujn? — 3. Aŭ en iuj ekzamenoj, ĉu ili havigus pliajn poentojn al la kandidatoj?

VI. De kiuj instruistoj tiu instruado estu plenumata? — 1. Ĉu de tiuj pri gepatra lingvo? — 2. Pri fremda lingvo? — 3. Ĉu de specialaj E.-instruistoj?

VII. 1. Kiamaniere trovi nun la bezonatajn instruistojn? — 2. Estonte, kiel organizi ilian formadon?

VIII. Personaj spertoj kaj sugestoj.

B. Teknika instruado.

I. En kiajn lernejojn E. estu enkondukata? En profesiajn?

II. En kiajn klasojn? En komencajn, mezajn, finajn?

III. Kiomjaraj estu la lernantoj?

IV. Ĉu instruado de E. estu sendependa? (Rekta metodo aŭ gramatika?) Ĉu kunligita kun tiu de gepatra lingvo? Kun tiu de fremda?

V. Ĉu E. estu instruata de speciala instruisto? De tiu pri gepatra lingvo aŭ pri fremdaj?

VI. Kie kaj kiel estu formataj tiuj instruistoj? Ĉu en la instruistaj institutoj?

VII. Kia estu la daŭro de ĉiu leciono?

VIII. Po kiom da lecionoj ĉiusemajne? Ĉiujare?

IX. Kiamaniere distribuotaj dum la jaro?

X. Ĉu la atesto pri tiu lernado konsistos el aparta diplomo?

XI. Kiajn avantaĝojn ni petu por la kandidatoj, provizitaj per tiu diplomo, okaze de aliaj ekzamenoj aŭ konkursoj?

XII. Personaj spertoj kaj sugestoj.

Demandaro pri la Instruado al Blinduloj kaj Surdmutuloj.

I. Ĉu frua ekinstruo ne estus speciale rekomendinda kaj ĉu la fonetika simpleco de E. ne plifaciligus al ili asimiladon de sia gepatra lingvo?

II. Ĉu ne estas preferinde ekinstrui E-on kontraŭ la fino de iliaj unuagradaj studoj, por ebligi al ili uzi tiun lingvon dum sia profesia edukado aŭ. dum siaj sekvantaj studoj?

III. Pro tio, ke ili estas dissemitaj kaj tre ofte mankas specialaj lernejoj, ĉu oni ne povas koncepti la kreadon de lernejoj, speciale aranĝitaj por ili, laŭ mona subteno komuna al pluraj ŝtatoj; progreso atingebla nur dank' al ĝenerala instruado de E.?

IV. Sciante, ke nur E. ebligus ekziston de publiko sufiĉe grandnombra por igi laŭspeze ebla la presadon en Braile de verkoj sciencaj, teknikaj, pedagogiaj, ĉu ne estus necese postuli de ĉiuj porblindulaj instruistoj la povosciadon de E.?

V. Ĉu ne sub la aŭspicioj de B. I. T. kaj Intern. Instituto por Intelekta Kooperado estu fondata iu „Tutmonda Instituto por la pli bona socia adaptiĝo de la blinduloj kaj surdmutuloj", kies lingvo estus E. kaj celo: unuigi ĉiujn adaptorimedojn, aparatojn, metodojn, librojn ktp.

VI. Spertoj kaj sugestoj?

2-a Prepara Komisiono.

Demandaro: Komerco, Industrio kaj Metiistaro.

1. Ĉu E. povus fari grandajn servojn en la medioj komercaj, industriaj kaj metiistaj? — a) por la publikigo de komercaj notoj en E, konigante produktojn eksterlande; — b) por aĉeto kaj vendo de brutaj varoj kaj de produktoj fabrikitaj eksterlande; — c) por la starigo de listo de fabrikitaj produktaĵoj eksporteblaj kaj de tiuj, kies importo estas limigita; — d) por la redakto de la indikoj pri la protekto de iuj produktaĵoj laŭ la leĝaro pri la invent-patentoj, markoj kaj modeloj, deponitaj sub kondiĉo de origina pruvo; — e) por la reprezentantoj-vojaĝistoj, kiuj serĉas la rimedon akiri eksterlande profesiajn konojn; — f) por la oficistoj kaj metilernantoj, kiuj deziras akiri seriozan konon de la lingvo de lando, kie ili plenumas provtempon en komerca firmo; — g) por la infanoj, kiuj iras eksterlanden por pasigi libertempon laŭ organizitaj interŝanĝoj.

2. Kia estos la metodo, uzota por enkonduki E-on en la komercajn, industriajn kaj metiistajn mediojn? — a) kreado de kursoj per la ĉambroj de komerco, sindikataj ĉambroj, metiistaj asocioj, ĉambroj de metioj, profesiaj sindikatoj ktp; — b) kreado de int. asocio por plifaciligi la interŝanĝojn komercajn, industriajn kaj metiistajn inter la diversaj landoj per E.; — c) kreado de tradukа servo je la dispono de la membroj de Internacia Asocio kaj de la firmoj ĝenerale; — d) kreado de interrilata bulteno inter la membroj de Internacia Asocio, publikiganta praktikajn informojn pri aĉeto, vendo, interŝanĝo de komercaj produktaĵoj, pri industria dokumentado kun indiko de proponoj kaj petoj de ofico por la E-on-uzantoj, kai de la ebleco trovi reprezentontojn kaj reprezentotajn firmojn; — e) uzado de E. en la internaciaj medioj, ĉe la Internacia Ĉambro de Komerco, internaciaj kongresoj, specimenaj foiroj, internaciaj ekspozicioj ktp.; — f) uzado de E en la oficialaj medioj (jurinta tradukisto); — g) kreado de ekzameno kun diplomo donante certajn avantaĝojn en la landoj, kie E.-kursoj, ĉu devigaj ĉu laŭvolaj, ekzistas en la lernejoj; — h) kreado de E.-kursoj en la komerclernejoj de la landoj, kie tiaj kursoj ne ankoraŭ ekzistas; — i) personaj sugestoj.

Demandaro: Industria Proprajo.

I. Ĉu estus utile, ke la korespondado kun Internacia Oficejo de la Industria Proprajo en Bern estu farata en E. kaj ke la depon-aktoj povu ankaŭ esti verkataj en E.?

II. Ĉu estus utile, se (atendante, ke estos permesate registrigi internacie la petojn rilate al la patentoj pri inventoj — (kiel oni nun faras rilate al komercmarkoj) ĉiu lando permesus la deponon de la petoteksto en E.? Tio havus la grandegan avantaĝon, unuigi la tekston en ĉiuj landoj, multe mallongigus la tempon necesan por deponi la peton en ĉiuj fremdaj lingvoj, kaj eĉ permesus presigi la peto-tekston deponotan.

Internaciaj Specimenaj Foiroj.

Demandaro: Internaciaj Specimenaj Foiroj.

Ĉu E. povas utili en la internaciaj foiroj: al la administrantoj? al la ekspozantoj? al la aĉetantoj? al la vizitantoj?

Kiamaniere oni utiligu ĝin: por la propagando? por la negoco?

Kiujn propagandajn rimedojn jam uzataj oni devus konservi kaj disvastigi: afiŝoj, glumarkoj, faldprospektoj, poŝtkartoj, gazetartikoloj por traduko, duonpagaj biletoj?

Kiujn administrajn dokumentojn oni tradukus en E-on?

Kian profiton por la foiro prezentus E.-stando kaj -tago?

Kiamaniere oni ambaŭ organizu?

Kiel oni povus koni la fremdajn komercistojn kaj industriistojn, kiuj povus fariĝi ekspoziciantoj dank' al E?

Kiel E. povas utili al fremdaj aĉetantoj kaj vizitantoj?

Ĉu necasas krei inter la Foiroj interkonsentojn pri la uzado de E.?

Ĉu necasas organizi en la administrejoj de la foiroj E.-fakon kun unu aŭ kelkaj E-aj parolantaj oficistoj?

Demandaro: Banko kaj Borso.

Por plifaciligi la internaciajn bank- kaj borsrilatojn, ĉu vi opinias interese, ke la sekvantaj dokumentoj estu redaktataj nacilingve aŭ en E. a) la vivoregistradaj aktoj (pri naskiĝo, geedziĝo, morto); b) la oficialaj dokumentoj (atesto pri nacieco, landjura kutimo); c) la pagrimedoj (ĉekoj, transspezaj kontavizoj, kambioj, vojaĝkambioj); d) la prikomercaj paperoj (fakturoj, kost-etatoj, dogankambioj); dokumentoj pri vetur-kambioj; 2) la diversaj dokumentoj (titoloj, statutoj, emisimendiloj, indeksoj kaj notoj de borstabeloj, emisprospektoj).

Ĉu vi konsentas kunlabori pri la studo de teknika E.-vortaro por la priparolitaj dokumentoj?

Demandaro: Dogan-oj.

I. Ligo de Nacioj preparis terminaron pri doganaferoj en franca kaj angla lingvoj. ĝi nun ne ankoraŭ eldonatan. Verŝajne la du tekstoj ne estos identaj. Ĉu vi opinias, ke tria terminaro en E. povus precizigi la sencon de la terminoj?

Paska kutimo en Salzburg.

Orig. artikolo por AE de **inĝ. E. H. Jordan**, „Bundeskommissariat für Heimatdienst" en Federacia Kancelierejo.

Aper-klakado („aper" estas „libera de neĝo") komenciĝas en februaro, kiam la kampoj kaj herbejoj fariĝas liberaj de neĝo pro la komenciĝanta degelado. La kutimo estas praktikata en la ĉirkaŭaĵo de la urbo Salzburg, en Pongau kaj laŭflue de Salzach-rivero ĝis Oberndorf. Sur placo aŭ kampo staras 7,9 aŭ 11 fortaj junaj viroj kaj svingas laŭ ordono de la gvidanto siajn 4—6 m longajn vipojn, kun ornamitaj ŝnurfinaĵoj, laŭ certa takto, tiel ke ritma krakado estiĝas, kiu despli malproksimen sonas, ju pli multe la tero estas kovrita per glacio. Laŭ popoldiro „Aper-klakado" forpelu la vintrodemonojn kaj gardu la kampojn kontraŭ la danĝeroj de postvintro.



II. Ĉu la uzado de E. por la rilatoj inter la doganadministracioj, la transitistoj, la komercdeponistoj de la diversaj landoj faciligus la internacian komercon? Ĉu vi alcelus tiun uzadon, se aliaj administracioj (societoj) same agus?

III. Ĉu estus utile, ke kiel en Boulogne-sur-Mer, la doganinformoj ĉe la landlimoj estu verkataj en nacia lingvo kaj tuj poste en E.?

IV. Ĉu estus utile, ke la atestoj pri deveno (kiel jam faris Komerca Ĉambro en Paris), la triptikoj kaj la ceteraj doganpaperoj estu verkataj en la nacia lingvo kaj en E.?

V. Ĉu estus utile, ke la doganistoj scipovu E-on? Ĉu vi estus preta fari eksperimenton tiacele, se aliaj administracioj same agus?

Demandaro: **Fervojaj administracioj, aertransportoj, fervojaj transportoj kaj navigaciaj kompanioj.**

A) Rilatoj inter Administracioj kaj Kompanioj.

1. Malfacilaĵoj konstatitaj dum kongresoj kaj konferencoj: a) indiki la lingvojn ĝenerale uzatajn; b) indiki kiel estas faritaj la tradukoj de paroladoj, komunikaĵoj aŭ interrompoj dum la debatoj; c) je kiu proporcio vi taksas la nombron de personoj devigataj seninteresiĝi pri la debatoj? d) sub kiu formo ŝajnas al vi eble enkonduki neŭtralan helplingvon en la kongresojn aŭ konferencojn? e) ĉu vi opinias eble akcepti nur unu nacian lingvon (francan, anglan, germanan) kiel nuran oficialan lingvon? f) Ĉu via administracio (aŭ societo) estus preta eventuale subteni proponon celantan akcepti E-on kiel sole oficialan lingvon aŭ egalrajte kun la naciaj lingvoj?

2. Malfacilaĵoj en korespondaj interŝanĝoj. a) En kiuj lingvoj vi ricevas leterojn de alilandaj kompanioj aŭ administracioj? En ilia nacia lingvo aŭ en alia lingvo servanta kiel helplingvo? b) Ĉu vi havas ĉiam surloke la kompetentajn tradukantojn aŭ ĉu vi devas peti fremdajn personojn? c) Ĉu via administracio (aŭ societo) estas preta respondi en E. al leteroj eksterlandaj, kiuj estus senditaj en tiu lingvo?

3. Malfacilaĵoj traduki teknikajn terminojn. a) Ĉu vi havas kelkfoje malfacilaĵojn por traduki certajn terminojn? b) Kiujn vortojn vi uzas? c) Ĉu estas ĉiam preciza korespondeco en la signifo atribuita al sama teknika termino? ekz. dispatcher, en Francujo kaj Usono. d) Ĉu vi konsentas partopreni la revizion, per internacia komisiono, de la teknikaj terminoj nun uzataj en E. por akiri pli precizecon nedubeblan?

4. Praktikaj rimedoj por solvi la problemon de la lingvo internacia. a) Ĉu necesas por tiu tasko komisii organismon ekzistantan aŭ krei novan? b) Se vi juĝas nenecese krei novan organismon, tiukaze, kiu povus esti komisiita por la studoj? Ekz. por la fervojoj: Konferenco en Bern — Internacia asocio de kongresoj fervojaj — Unuiĝo de fervojoj kaj aŭtomobil-trafiko — Konstanta komitato de transportoj per fervojo de Ligo de Nacioj — Komisiono pri fervojaj transportoj de Internacia Komerca Ĉambro.

B. Rilatoj inter la Servoj kaj la Publiko.

1. En la fiksaj instalaĵoj kiel stacidomoj aŭ surbordiĝejoj. a) Ĉu vi trovas utile meti indikojn en fremdaj lingvoj? En kiom da lingvoj vi estas devigata tion fari? b) Por anstataŭi diverslingvajn indikojn, ĉu vi uzas interpretsignojn? Kiom estas ilia nombro kaj kiamaniere la publiko povas rekoni ilin? c) Ĉu vi provis uzi konvenciajn signojn aŭ elvokigajn bildojn por ĉiuj facile kompreneblajn? Ĉu tiuj provoj donis rezultojn? d) Ĉu vi jam uzis E-on? Dum kongresoj aŭ en ordinara laboro? e) Ĉu vi opinias, ke estus elspezo tro grava por via administracio (societo)?

2. Por la transportiloj (trajnoj, veturiloj, ŝipoj, aviadiloj), la sama demandaro kiel por 1.

3. Presaĵoj kaj dokumentoj, servantaj por transportoj (biletoj, frajtleteroj, kvitancoj ktp.).

a) Ĉu vi uzas vojaĝbiletojn plurlingvajn? b) Por la transporto de varoj, ĉu vi havas dokumentojn diverslingvajn (frajtleteroj pri internacia fervoj-trafiko, ekzemple? c) Ĉu vi opinias eble dulingve eldoni ĉiujn dokumentojn pri transporto, la indikojn en nacia lingvo kaj la samajn indikojn en helpa lingvo? d) Ĉu la elspezo estus ne proporcia al la facileco akirita? e) Ĉu viaj tarifoj estas tradukitaj en fremdaj lingvoj? Ĉu vi disdonas ilin senpage aŭ ĉu vi pagigas la interesitojn? f) Ĉu vi jam publikigis en helplingvo kaj ĉu vi publikigas ankoraŭ? g) Se la uzado de helplingvo estus rekomendata, en la rilatoj de transport-entreprenoj kun la publiko, ĉu vi estus preta tuj iri ĉi tiun vojon?

Demandaro: Komerca Ŝiparo, Aviado kaj Havenoj.

1. Ĉu ŝajnus al vi interese, ke E. estu uzata sur la ŝipoj: a) por la ŝipgazetoj? b) por la menuoj? c) por la diversaj informoj petataj al la ŝipkomisaro? d) sur la ŝipoj kaj aviadiloj, por la radiotelefono?

2. En la landoj, kie ekzistas oficiala ekzameno por la titolo de ŝipkomisaro, de aviadil-gvidisto ktp., ĉu vi opinias, ke E. devus esti enkondukata en la programon de tiu ekzameno? Ĉu devige aŭ laŭvole?

3. Ĉu la diversaj dokumentoj uzataj en la ŝipmedioj, ekz. konosimento, ŝipasekura poliso ktp. estu redaktitaj nacilingve aŭ en E.?

Demandaro: Turismo.

1. Ĉar ne estas eble eldoni gvidlibrojn pri turismo en ĉiuj lingvoj, ĉu vi opinias necesa: a) eldoni ilin en E.? b) publikigi en la turismaj gvidlibroj nacilingvaj kelkajn paĝojn kiel resumon en E.?

2. Ĉu vi opinias necesa, ke la oficistoj de la turismaj oficejoj scipovu E-on? Se jes, ĉu vi estas preta organizi eksperimenton?

4. Ĉu vi opinias interesa, ke almenaŭ la oficistoj, kiuj akceptas la klientaron en la hoteloj, scipovu E-on?

5. Sama demando pri la taksiŝoforoj, la tram-, aŭtobus- kaj aŭtoĉarkonduktoroj, la vendistoj en grandaj magazenoj, la oficistoj pri monŝanĝo en bankoj, la oficistoj de la vojaĝoficejoj.

6. Ĉu vi opinias utila, ke la vojaĝoficejoj, la fervojkompanioj, la hoteloj kaj restoracioj uzu unu nuran lingvon por la ĉiutagaj rilatoj? Ĉu tiu solvo faciligus la turismon? Ĉu tiu lingvo povus esti E.?

7. Ĉu vi opinias utila, ke la gvidlibroj de la Gastejoj de la Junularo estu verkitaj en E., kaj ke la gastejpatroj scipovu tiun lingvon?

Demandaro: Poŝtoj — Telegrafo — Telefono.

Ĉu E. povas esti valora helpilo en la internaciaj P. T. T.- a- rilatoj, ĉiufoje, kiam franca lingvo ne estas uzebla?

Nuntempe la korespondaĵoj devas esti franclingve, sed pli kaj pli la oficistoj respondas en sia lingvo: ĉu la neŭtrala, facile lernebla E., kiu vundas nenies ofendiĝemon, ne estus rekomendinda?

Ĉu ne estus eble, por efektivigi normigon, uzi en ĉiuj servadaj interrilatoj presaĵojn kun E.-traduko?

Ĉu oni ne devus aldoni E.-tradukon ankaŭ sur la presaĵoj uzataj de la publiko por internaciaj rilatoj (ekz. sur respondkuponoj)?

sur la afiŝetoj montrantaj la apartan fakon de ĉiu giĉeto?

sur la informiloj kaj klarigiloj rilate al uzado de aparatoj?

Ĉu la kaŭzo de ne-disdonado de letero ne estu klare tradukita en E.

La sumo de internacia mandato estas ofte duba kaj malĝuste pagata: ĉu la tiel simpla kaj logika nombrado esperanta ne estu aldonata al la nuna tabelo kaj prefere uzata?

Ĉu la oficistoj de la giĉetoj, kiuj scipovas E-on, ne devus esti montrataj per E.-insigno, la verda stelo?

Paskaj ludoj en Stirio (Laikaj ludoj).

Orig. artikolo por AE de inĝ. E. H. Jordan, „Bundeskommissariat für Heimatdienst" en Federacia Kancelierejo.

Grandan ŝatatecon ĝuas la tiel nomataj Paradiz-ludoj, en kiuj flanka de la aktoroj estas prezentata la vivo de la unua homo, la unua peko, kaj la kondamno el la paradizo, por poste pli forte akcenti la ofermorton de l' Savinto. En sia plejofte tre simpla prezentado ili tamen enhavas tiom da meditemo kaj prezentas Dio-Patron kiel juĝiston, Dio-Filon kiel la liberigantan mildecon kaj kompaton kaj Sanktan Spiriton kiel justecon, dume la diablo Lucifero kun siaj helpantoj, Satano kaj Boliano, jam atendas la forpeladon de la homo el la paradizo, sian kaptaĵon. La kronado de la ludo estas fine la savo de la tuta homaro per la ofermorto de Di-Filo.

Ĉu vi aprobas uzadon de E. dum la priservaj telegrafaj rilatoj?

Ĉu la internaciaj telefonaj komunikoj ne estus pli rapide preparataj, se la oficistinoj scipovus E-on?

Ĉu la klarigoj rilate al aŭtomata telefono ne estu tradukitaj E-en?

Ĉu en radio ne estus eble anonci en E. la nomon de la stacio kaj de la ĉefaj dissendaĵoj?

Ĉu la administracioj devas konsili al la oficistaro lernadon de E.? Ĉu ili ne povus havigi ian profiton al tiuj, kiuj ĝin scipovas?

Ĉu administracioj ne devus faciligi partoprenon al kursoj internaciaj, ĉiujare organizataj, aŭ al stud-vizitoj okaze de la E.-kongresoj?

Ĉu la profesiaj kaj interhelpaj asocioj ne povus nomi E.-sekretariojn?

Ĉu la profesiaj revuoj ne devus traduki E-en siajn tabelon kaj resumon de la ĉefaj artikoloj?

Demandaro: Polico.

1. Nuna situacio. a) Ĉu E. estas nun instruata al policistoj en via loko? b) Kiom estas la proksimuma nombro de policistoj scipovantaj E-on en via loko? c) Ĉu ili povas ĝin uzi dum la dejoro? d) Ĉu la policistoj, uzantaj E-on, portas distingigan insignon dum dejoro? e) Indiki la oficialan permeson (aŭtoritato kaj dato). f) Ĉu la profesiaj grupoj de via loko aŭ lando estas favoraj al E.? Ĉu ili jam konigis sian opinion? Kiam kaj kiusence? g) Ĉu la profesiaj organoj de via lando mencias E-on, kaj kiusence? h) Kiujn servojn E. jam faris al la polico en via loko aŭ lando?

2. Estontaj ebloj. Kiujn servojn, laŭ vi, povas fari E. al la polico? a) En Internacia Komisiono de Kriminala Polico? b) En la serĉado de internaciaj krimuloj (juĝa identeco)? c) Al la Radio-Polico? d) Al la profesiaj organizoj de polico? e) Al la policaj organoj el vidpunkto de profesia dokumentado? f) Por instruado de policaj sciencoj al la policaj oficistoj de ĉiuj landoj? g) Al la polico ĉe la landlimoj? Livero kaj kontrolo de pasportoj? h) Al la polico por trafiko? i) Por la subpremo de kontrabando pri narkotaĵoj kaj fikomerco pri virinoj?

Adreso: „Esperanto en la moderna vivo", **34 Rue de Chabrol, Paris (10).**

La devizo por 1937: Batalo kontraŭ la senlaboreco.

Ĉi tiu parolado de Statsekretario **Hans Rott,** farita la 12an de januaro 1937 en Radio-Wien, estis disponigita al AE. Tradukis **Ernst Werner,** fakoficisto en la ministerio por sociala administrado.

Kiam oni en 1934 kreis en Aŭstrio propran Statsekretariejon por la protekto de laboristoj kaj salajruloj, oni eble intencis nur provizoran institucion, alfaritan al pasantaj politikaj cirkonstancoj. Sed la natura evoluo donis al tiu ĉi provizora solvo, kiel ofte okazas en la vivo, nur poste definitivan sencon kaj signifon. Nuntempe oni povas sen troigo diri, ke tiu ĉi institucio multe kreskis super sian oficialan kadron kaj fariĝis respektinda servo, kies klientoj venadas el preskaŭ ĉiuj grupoj de la popolo. Krom la regulaj taskoj sur la granda kampo de la sociala administrado — la ŝtatsekretariejo ja estas aligita al la ministerio por sociala administrado — necesiĝas helpo kaj interveno en multaj individuaj okazoj, precipe en laborkonfliktoj kaj traktadoj pri kolektivaj laborkontraktoj. Ĉiam denove venas delegitaj reprezentantoj de laboristoj kaj petas urĝan helpon kaj mendojn por sia firmo, kiu sen tio devus maldungi laboristojn. Estas karakterize por la ŝanĝitaj cirkonstancoj, ke ofte venas laboristaj delegitoj gvidate de sindikata sekretario kune kun la fabrikestro, por komune pledi por sia komuna afero, laŭ la ĝuste komprenita ideo de la laborkomuneco. Kelkfoje necesiĝas subteni elprovitan institucion, kiu estas endanĝerigita de tro rapida juĝo, kiel ekzemple „Libervola Laborservo". Ĝia nuntempa tasko devas esti ne nur okupi gejunulojn **iamaniere,** sed ilin eduki kaj

Tiel estis!



perfektigi por la celo de specialaj, fakaj laboristoj, kiaj jam komencas manki.

Super tiuj sennombraj unuopaj agoj pendas la granda, konstanta zorgo pri la plej protektinda rajto de ĉiu civitano, **la rajto je laboro,** laboro certiganta la vivtenadon. Jen la kernproblemo, kiun kunsolvi estas la plej grava tasko por ĉiu, kiu nuntempe estas kunresponda por ŝtato kaj popolo. Nia federacia kanceliero tial proklamis kiel devizon por 1937 la batalon kontraŭ la senlaboreco. Laŭplana laborhavigo kaj justa disdono de la laborebloj estu la celo de nia klopodado!

En la pasinta jaro la Aŭstria produktado ĝojige pliiĝis. Sed la nombro de la sub-



La produktado progresas: 1. Flu-produktado en milionoj da kilovathoroj; 2. plumboproduktado po 100 tunoj(t); 3. ferminaĵoj (kiel la aliaj) po 1000 t; 4. krudfero; 5. krudŝtalo; 6. lamenaĵoj; 7. fosfatoj; 8. kotonfadenoj; 9. kartonaĵoj en vagonoj; 10. aŭtomobiloj po pecoj. Meznombroj: januaro ĝis septembro.

venciitaj senlaboruloj bedaŭrinde tamen ne malkreskis. — La registaro ja kontraŭbatalis. Por venki la krizon, ĝi disponigis en la lastaj jaroj konsiderindajn rimedojn por publikaj laboroj. La faritaj spertoj decidigis, pro **ekonomiaj** konsideroj disponigi rimedojn jam nur por vere produktivaj entreprenoj, kiuj povas amortizi la elspezitan kapitalon, kaj pro **socialaj** konsideroj laborigi nur tiujn laborestrojn, kiuj respektas la laborkontraktojn kaj la socialajn protektoleĝojn. Krom la ŝtata laborhavigo oni provas malaltigi la prezojn de nutraĵoj, fari komercpolitikajn kaj similajn faciligojn. Ĉio tio ja povas rezultigi partajn sukcesojn, sed ĝi ne vere solvas la problemon de la senlaboreco.

Kio do povas efektive helpi kontraŭ la senlaboreco? Kiu vojo kondukas al savo? Kvankam mi scias, ke estas danĝere ĝin eldiri, mi devas tamen diri, ke ĝi estas **vojo returne.** Unu el la kaŭzoj de la ekonomia krizo kaj senlaboreco estas sendube la foriro de multaj homoj el la kamparo en la urbojn. Tio sekvigis ŝanĝon inter la ekonomigrupoj kaj troon da laboristoj en la industrio, kies produktoj post la milito ne estis plu sufiĉe vendeblaj eksterlande. Nur en la lastaj jaroj de graviĝinta krizo oni konsciiĝis pri tio, ke la doma mastrumado sur la kamparo, plimilpli en si fermita, estas ekonomis celo reaspirinda. El tio estiĝis en nia lando kaj en la plej multaj industrilandoj la kreskanta malgrandkoloniado de la urbanoj. Ĝia vera celo estas ankoraŭ ne sufiĉe konita, vere ĝi devas resendependigi grandan parton de la popolo en la zorgo pri la necesa nutrado kaj reŝanĝi nian popolekonomion de troa monekonomio al relative memsufiĉa doma mastrumado.

Tiu ĉi ŝanĝo de la ekonomio estas realigebla per la **„kromgajniga koloniado"** (germane „Nebenerwerbssiedlung"). Ĝi estas farata de la okupataj laboristoj kaj ne de la senlaboruloj. Ĝi estas jene karakterizita: La reduktitaj laborenspezoj el industria laborado dum mallongigita labortempo estas kompensataj per la memproduktado el la kolonio. Aliflanke oni okupas novajn laboristojn kaj samtempe ilin koloniigas. Nepre rezultas malpliiĝo de la senlaboreco.

Grandskala koloniigado, eventuale kune kun mallongigita industria laborado, do ebligus justan kaj laŭplanan distribuon de la laborebloj inter ĉiuj rajtigitaj popolanoj. La tiel koloniigitaj laboristoj malgraŭ reduktita laborgajno havus plian sufiĉan vivtenadon, precipe por la tempoj de evantuala senlaboreco kaj de l'maljuneco, ol ili povus atingi plene laborante en la industrio. Kaj grava gajno estus, ke per tio la laboristoree partoprenus en la hejmatero, ke li reŝanĝus sian laboron en posedaĵon kaj regajnus ĝojon je sia familio kaj siaj infanoj, liberigite de la prema zorgo pri sia ekzistado.

Sed por ke sukcesu la konstruado de la kampara-industria ekonomikombino, oni

Tiel estu!



devus aranĝi la kromgajnigajn kolonioj laŭplane kaj organe, komune koloniigante pli grandajn grupojn de laboristoj, plej bone en la kadroj de fabrikad-komunumoj. Ankaŭ oni nepre devus instrui kaj prizorgi ilin en la komenco kaj en la unua tempo. Por pretigi la necesajn terpecojn, necesiĝos specialaj leĝoj.

Vere la malfacilaĵoj, precipe la financaj, estas grandaj, sed ili ne estas nevenkeblaj. La laŭprofesia novordigo en Aŭstrio montras la vojon ankaŭ por la solvo de tiu ĉi problemo, kaj la novaj profesiokorporacioj per kuraĝa iniciato plej bone pruvus la taŭgecon kaj pravigus la novan ordon en Aŭstrio antaŭ la tuta mondo.

La sekvoj de grandskala kromgajniga koloniado estus gravaj faciligoj por la tuta ekonomio: Oni povus malpliigi la socialdepagojn kaj impostojn kaj la kostojn de la produktado, kvankam malcentrigante ĝin je profito de la popola saneco, pligrandigi la aĉetopovon de la popolo.

Kompreneble ankaŭ ĉiuj aliaj formoj de la batalo kontraŭ la senlaboreco estu ne malzorgitaj. Precipe la jam urĝe solvota problemo de la senokupa junularo devigas ĉiujn respondecajn gvidantojn, alceli krom siaj propraj interesosferoj ian pligrandcelan, komunan agadon. — Konsciante nian respondecon, kun la sincera volo, antaŭenigi ĉiam la **komunajn** taskojn, kaj kun kuraĝo kaj fido, ni komencu la batalon kontraŭ la senlaboreco, la batalon, kiu estu nia ĉefa devizo por la jaro 1937!

Rudolf List:

El la romano „La servisto Miĥaelo".

(Eldonejo **Paul Zsolnay**, Wien-Berlin)

Tre **baldaŭ** aperos **„Aŭstria Antologio de la 20-a jarcento"** en 6 volumoj po almenaŭ 64 paĝoj.

La 1-a volumo prezentos al vi ekzemplojn el la verkado de vico da eminentaj nuntempaj aŭtoroj kiel Enrica Handel-Mazzetti, Anton Wildgans, Max Mell, Guido Zernatto, Rudolf Henz, Friedrich Schreyvogel, Robert Hohlbaum, Heinrich Suso-Waldegg, Karl Heinrich Waggerl, Dolores Viesèr. La elekton inter la verkoj, kiujn tradukas konataj s-anoj, aranĝis Rudolf List, kies propra verkado estas reprezentata per provo el lia romano „Servisto Miĥael", rekone laŭdita de la kritikistoj. Jen ni peras kvazaŭ kiel kostprovon el la 1-a volumo de Antologio la ĉapitron el la finparto de la romano. La heroo de la libro, vilaĝa instruisto Miĥael Rosenkranz, per sortobatoj ĵetita el sia profesia vivo kaj kondamnita al la ekzisto de malriĉulo en la grandurbo, rakontas — la romano estas en formo de tagĵibro — unu el siaj travivaĵoj en la dumvintra grandurbo.

Tra la Danubovalo blovas akra vento. Sovaĝe ĝi ĵetas la ondojn kontraŭ la digon, kiu disigas la superakvejon de la lando kulturata. Akvobirdoj fantomas kun unutona flugilbato super la malaltaĵon. De la Floridsdorfer ponto bruas la fervojo. La vento portas pluverojn en sia mantelo.

Kelkaj kabanoj staras solaj inter riverego kaj lageto. En somero, kiam la boatoj de gajaj homoj ŝanceliĝas tra la akvo de l'apartigita riverbranĉo, ili provizas manĝetaĵojn kaj refreŝigajn trinkaĵojn. Nun ili estas forlasitaj kaj senvivaj krom unu: tie ĉi iun vi, Miĥaelo, estas hejme, homo inter homoj ne pli riĉaj kaj ne pli malriĉaj ol vi mem, perdito en la valo de l'vivo.

Mi memoras ankoraŭ la tagon, kiam mi, senfortigita ĝis senvoleco, trovis tiun ĉi hejmon de mia mizero, post noktoj sub pontoj kaj pordegoj, sub la frostklara, senkompata kovrilo firmamenta. Mi ŝanceliras de la digo malsupren al kabano, el kiu, ŝajnas al mi, kirliĝas maldika serpenteto de fumo. La fumeganta trenŝipo, kiu malheligante la fonon, moviĝas kontraŭflue, preterpasis. Mi vidas nun la fumon klare antaŭ mi. Mi alproksimiĝas al la kabano. Infano ploras. Mi frapas al la malalta pordo.

Loĝas tie tri homoj: patro, patrino kaj infano. Estos loko ankaŭ por kvara. Ĉi tie neniu demandas pri aero, kiun oni bezonas por spiri. Ĉi tie, Miĥaelo, vi havas ankoraŭ spacon por etendi viajn lacajn membrojn. Via antaŭlasta ŝilingo efikas miraklon. Pro tia donaco cedas eĉ la domestro sian lokon. Kaj li disponigas al vi kiel varmajn kovrilojn du sakojn. Jes, Miĥaelo, unu malriĉulo estas gasto de alia.

Vi aŭdas, dormiĝante, doloran parolon: restas nur la memorimagoj de kelkaj vortoj kvazaŭ glaciiĝintaj larmoj en via koro. Tri jarojn senlabora. Du infanoj transprenitaj de la magistrato. Por la tria apenaŭ tiom, ke ĝi povas sin treni plu sur la vojo de la malriĉeco. Depost kvin jaroj sen hominda loĝejo. Tamen boniĝas, kara sinjoro: la ligna kabano estas pli bona ol la malseka kelo, en kiu oni antaŭe loĝis kvinope, kaj de tie ĉi, tion vi scias nun, Miĥaelo, estas la lasta, plej lasta fino de la paradizo, la rubejo, ne tre malproksima. Nur kelkcente da paŝoj, kaj vi trovas forĵetaĵojn de la oceano de l' vivo, kio finfine sufiĉas por via malmulta mizero.

Jen vi havas hejmon, Miĥaelo. Ekstere kantas la ventego sian kanton. La malfiksa lado sur la intertabulejoj kunsonas kvazaŭ dolorkriante. Vi estas kaptito de l' malvasta spaco kaj servisto inter servistoj.

Feliĉo en mizero: la varmeco de forno. Vi forgesas ĉion alian, kion vi malhavas: tablon, seĝon, liton. Kaj vi ne bezonas fenestron por rigardi en la vintrorigidan mondon, sufiĉas truo inter tabuloj, kovrita per vitrorompitaĵoj. Se vi havas tempon por rigardi kaj stendi, la radio de l' tagmezo refraktiĝas multkolore kiel en plej bela prismo.

La elrigardo estas malproksima kaj bela, trans la riverego gigantas la loĝejegoj de Heiligenstadt. Dekstre elstaras la turdomoj de Jedlesee. Kaj se vi esplorrigardas profunde, en la internon de la mondo antaŭ vi, tiam vi vidas en la marmore malvarman koron de la urbego.

En la malfrua vespero falis neĝo. Mi vadas zigzage trans la riveran malaltaĵon en la mola veluro de la flokoj. Miaj piedoj estas malsekigitaj, la malseketa malvarmo en mi suprenrampas ĝis la ŝultroj. Kaj tamen tie ĉi estas ankoraŭ pli agrable ol en la kabano; tie ĝemegas malsana infano inter la lignomuretoj de l' malespero.

Sur la supraĵo de la digo staras policisto. Tuj li plu paŝos sur sia neĝosternita vojo. Ĉi tie ne estas vivantoj krom ni, eble, ke vi ie trovas forlasitan mortinton, unu, kiu kuris for de la malmildaj leĝoj kaj el la malmilda mondo.

Provu ĝin, Miĥaelo, kaj konfidu al la leĝulo taskon, kiu estas multe pli grava ol la serĉado de la mizeraj forkurintoj de l' vivo.

Mi migras sur la deklivo supren. Malantaŭ mi restis nur malprofundaj postesignoj. Densaj neĝeroj forviŝis ilin dum momento. La policisto rimarkas, ke mi venas al li.

„Sinjoro inspektoro", mi diras al li. „Vi povus fari bonan agon; tie malsupre en la kabanaĉo kuŝas febranta infano. Ni devas transporti ĝin en la malsanulejon, se ĝi ne pereu mizere."

La policisto ekzamenrigardis min de supre ĝis malsupre. „Nu fidebla vi vere ne aspektas, juna viro kun la malĝoja vizaĝo, escepte mi volas vin kredi. Vere, povas esti ankaŭ insida ruzo, min logi tien, dum ĉi tie supre ekokazos la friponaĵo. Estas pli bone kunpreni la ulon kaj prenigi la infanon per savaŭtomobilo."

„Viajn paperojn mi petas!" Feliĉo, ke mi havas la restaĵojn de miaj dokumentoj en mia poŝo.

Li legas en la lumo de sia poŝlampeto, la flokaj dancetas en hela rondodanco en la cirklo de l' lumo: „Miĥaelo Rosenkranz . . ."

„Via profesio?" Lia voĉo estas akre senkompata.

Via profesio, Miĥaelo? Vi mem ne scias, kio vi estas, sed io vi estis, kaj tio estas ĝusta profesio, tiu restas al vi ankaŭ, se vi deflankiĝis kaj devojiĝis, oni ne bezonas sidi granda kaj grava antaŭ lernantaro, por esti tio.

„Instruisto."

La policisto skuas sian kapon. Vere tio estas legebla ankaŭ en la paperoj, tamen ĝi estas iomete nekredebla. La juna viro aspektas iom degenerinta, embuskas io malluma kaj abisma malantaŭ liaj maltrankvilaj okuloj.

„Vi venu kun mi. En la policejo ni esploros viajn aferojn pli detale. Domaĝe je viaj dokumentoj, se ili malsekiĝas pro la malbeninda neĝo."

Malbeninda neĝo? Leĝreprezentanto, vi ne scias, kion vi diras. La neĝo estas, ĉar la tero ĝin bezonas. La kreskado malbone prosperas, se ĝi mankas al la semitaĵoj. Kaj dekmil homoj en tiu ĉi urbo atendas ĝin kvazaŭ manaon. Eble ili jam staras centope antaŭ la dometoj, en kiuj morgaŭ matene severmienulo disdonos la slipojn de l' savo: panon por unu, du, kaj se plu neĝos, ankaŭ por tri tagoj. Se en la mondo ĉio okazus juste, vere devus bone neĝi dum la tuta vintro . . .

Ja tio estas tre grava, Miĥaelo, kion vi pripensas en via kapo kaj vi ĉiel pravas; sed vi forgesas la pli gravan aferon, kiu kondukis vin en la brakojn de tiu ĉi nekomprenema malamiko de la ĉielaj flokoj.

„Kaj kio okazos kun la infano?"

„Ni igos ĝin fortransporti. Ne ekscitiĝu, sinjoro . . ., jen mi ne rememoras vian nomon . . ."

„Rosenkranz."

„Ah jes, Rosenkranz . . ." Ŝajne la nomo amuzas lin. Li ĵetas ĝin antaŭ sin kiel ludpilkon. La vorto perdiĝas en la kristala turniĝado de la falanta neĝo.

En la policejo oni rigardas min ĝisfunde. La dokumentoj evidente estas en ordo. Kaj instruisto estis tiu Miĥaelo Rosenkranz, tio estas skribita per nigro sur blanko. Kaj kial li ne plu estas ĝi, tion li devas mem scii plej bone. Eĉ la plej milda juĝo por kelkiu estas kondamno al morto. Jes, la vivo estas tia.

Do vi havas la permeson, Miĥaelo, reiri en la liberan naturon, en la senliman liberecon de la vintronokto. En la profunda neĝo vi devas trovi vojon, vojon, ien.

Tradukis Ernst Werner

La belaj artoj en la nova Aŭstrio.

Originala artikolo por AE. de prof. **Carry Hauser**, kuratoro por la belaj artoj en ĉefgvidantaro de Patriota Fronto-Helpverko „Neues Leben“ (Nova Vivo), vicprezidanto de artistunuiĝo „Hagenbund“ *).

Ne nur la multaj sukcesoj, kiujn aŭstriaj artistoj atingis pro siaj verkoj kaj ĉiam denove atingas, sed ankaŭ la tiom granda nombro de sataj majstroj en la belartoj, kiuj vivas kaj kreas en Aŭstrio, devas esti taksataj kiel pruvo por la forta arta talento en nia popolo. Pli multe ol preskaŭ iu alia profesio, trafite de la spirita kaj ekonomia krizo, la artistoj de Aŭstrio montris per sia oferema kaj kuraĝa pluverkado, ke la kreanta forto en ili ne lamiĝis kaj ankaŭ ne povas esti malfortigata. Ekspozicioj pri flanke de publikaj aŭ privataj instancoj menditaj verkoj de pentroarto kaj plastiko kaj publikigaĵoj en en- kaj alilandaj gazetoj atestas pri tio.

De eminenta graveco por sana kaj vigla pluevoluo de la aŭstria arto estos speciale tiuj artistoj, kiuj senkondiĉe kaj plenaj de la konscio pri sia la popoltuton servanta misio iras tiujn vojojn, kiujn diktas al ili ilia artista konscienco kaj la kompreno de la nuntempa situacio.



1. premio. Pentristo Franz von Zülow, Wien, „Sankt Wolfgang“.

3. premio. Pentristo F. Aduatz, Obdach en Stirio, „Luggau“.

Hans Andre: Altarfresko en Sandleiten-preĝejo en Wien.

Interne de la movado de bildartista kreado dum la lastaj jardekoj, la aŭstria arto donis ĉiam valoran parton je pionira verkado. Guste pro la speciala propreco de nia popolo, surkonstruanta sur la popolinterliga tradicio, ankaŭ niaj artistoj ne devojiĝis al iu tro ekzaltita kaj unuflanka tendenco. Kontraŭe la aŭstria arto serĉas la sintezon inter la ekspresionisma formdetruado en la nordo kaj la tro facile en formaleco kaj estetiko unuigita maniero en la romanlingvaj landoj.

Sen povi senti la foreston de la ĝis memturmento altigita interna pensado, la aŭstria arto ĉiam klopodos, vesti ĉi tiun internan travivadon en koloroj kaj formoj, kiuj — sen esti malveraj kaj supraĵaj — ne estas sen beleco. Sed ĉio tio ne povas esti programo de artverkado. Ĉar ĉiu arto, kiu pensas povi direkti sin laŭ io imagita kaj subtile elpensita aŭ eĉ laŭ modaj vortoj, kiel ajn ili nomiĝas, estas degenerinta arto, kiu nepre estas netaŭga por vivi, ĉar al ĝi mankas la plej esenca — la libereco.

Se ni parolis pri sintezo en la aŭstria arto, tio okazis nur pro tio, ĉar tiu estas ekkonebla devige el la verkoj de niaj artistoj. Ĉi tiu speciala karakterizaĵo de la aŭstria arto donas al la artistoj la plej vastajn eblecojn de persona evolucio. Ĉar la aŭstria arta kreado devas esti, por povi plene kaj sendepende evolui, libera de ĝenadoj, kiuj sen interna neceseco malhelpus sanan evoluon. Tio entute ne signifu, ke ne estu farotaj necesaj limoj tie, kie senbrida personecemo aŭ senmalakcela malarto de nerespondaj elementoj estas rimarkeblaj. Elirante de ĉi tiuj vidpunktoj ankaŭ la zorgado pri la aŭstria arto flanke de P. F. Helpverko Nova Vivo estas decidata.

Duspecaj funkcikampoj ĉi tie unuavice estas videblaj:

1. La perado de la valoraĵoj pri artista kreado al la tuta popolo.
2. Helpo al la aŭstriaj artistoj.

Ĉi tiuj du funkcikampoj postulas unu la alian. Migrantaj ekspozicioj, kiuj prenas sian vojon tra la tuta federacia landaro, veku la intereson kaj la akceptpretecon de la tuta popolo. Al tio venas ankoraŭ paroladoj, gvidadoj ktp. Premikonkursoj kaj laborhavigo grandstilaj donu al la artistoj la eblecon, montri sian talenton kaj disponigi sian arton en la servon de la popolo.

Nur estu aludate al la konkurso „Pejzaĝdesegnaĵoj el Aŭstrio“, el kiu du premiitaj verkoj ĉi tie estu montrataj. La 5 premiitaj verkoj kiel ankaŭ 50 pluaj elektitaj el la granda nombro de la al la konkurso ensenditaj desegnaĵoj, vojaĝas kiel migranta ekspozicio tra la landaro de Aŭstrio. Aliaj migrantaj ekspozicioj („La malmultekosta vandornamaĵo“, „Bona meblaro“, „Artaĉaĵo kaj netaŭgaĵoj-bonaĵoj kaj malbonoĵoj“ ktp.) plenumos sian gustoformantan taskon.



Skulpisto Jos. Humplik, „La kureganto“ en Olimpiada-ekspozicio en Berlin.

Laborejoj, kiuj akcelas la landan artmetiaron kaj samtempe nobligas la bonan guston de la popolo, estas en preparo. Sen deziri ŝajnigi la konstruon de nova artmovado per organizaj kaj pure propagandaj rimedoj la P. F.-helpverko „Nova Vivo“ akcelos la aŭstrian artkreadon en

*) Artistunuiĝo „Hagenbund“, kiu unuigas penstristojn, skulptistojn kaj arkitektoin, estas fondita en 1900 kaj apartenas al la tri gvindantaj artistunuiĝoj de Wien. Hagenbund posedas propran ekspozici-konstruaĵon en I. distrikto, Zedlitzgasse 6, proksime de Stadtpark.

Favorita de la junartistaro de Aŭstrio ĉi tiu unuiĝo ne nur aranĝas ekspoziciojn pri verkoj de siaj membroj, al kiuj apartenas granda parto de la plej eminentaj aŭstriaj artistoj, sed ĝi ankaŭ montris dum la 37 jaroj de sia ekzisto bonegajn ekspoziciojn de alilandaj artistoj (Munch, Liebermann, Corinth, Menieur, Stursa, Mestrovic ktp. kiel ankaŭ vicon da reprezentaj kolektivekspozicioj de eŭropaj artistoj.).

Prezidanto de Hagenbund estas skulptisto prof. Karl Stemolak.

celkonscia kaj organa laborado kaj peros ĝin al la popolo. Nur la intima ligiteco inter popolo kaj artistaro povas konduki al nova florado de la aŭstria arto. Ĉar malgraŭ la al la aŭstria popolo karakteriza modesteco ĝi tamen, fiera pro la riĉeco de siaj artistaj fortoj kaj konscia, gardu sian kulturan taskon en la rondo de la popoloj.

Gravaj sukcesoj.

Ministro por **Publika Instruado s-ro Jean Zay** akceptis la proponon de Prepara Komitato de la Konferenco pri organizo de eksperimento pri enkonduko de E. en la lernejojn. Jus komenciĝis en Besancon oficialaj nedevigaj kursoj por la gelernantoj en la mezgradaj lernejoj, en Supera Lernejo por instruistoj kaj en liceo.

S-ro Dautry, ĝenerala direktoro de Ŝtataj Fervojoj. informas, ke sia administracio, kiu jam faris informojn en E. en la stacidomoj de Paris, tuj malfermos oficialan kurson de E. en la stacidomo de Saint-Lazare por la fervojistoj de la Ŝtato.

Parlamenta E.-Grupo dank al la klopodoj de s-ro Richard, vicprez. de la antaŭa grupo, kaj de nia amiko s-ro Bloch estas restarigita en Paris.

Tri gravaj sukcesoj, por kiuj la tutmonda esperantistaro devas gratuli al niaj francaj samideanoj!

Jen modela laboro, imitinda!

Nia Esperanto-hejmo en Aŭstrio.

Detailoj estos diskonigataj per Radio-Wien la 19. de marto je 22 h 20.

Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio interkonsente kun AEA preparos ankaŭ du vintrosportejojn malmultekostajn a) en Niederösterreich por la s-anoj el Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Polujo, Jugoslavujo ktp. kaj b) en Tirol por Germanujo, Skandinavaj Ŝtatoj, Nederlando, Belgujo, Anglujo, Francujo, Svislando, Italujo.

Detaloj sekvos!

Al la nacia repacigo de Eŭropo.

Montriĝis en tuta Eŭropo granda interes por ĉi tiu novfondiĝo kaj ankaŭ inter esperantistoj. Kiuj inter vi deziras helpi al la vere idealaj ideoj, al kiuj dediĉis siajn tutajn fortojn aro da seriozaj homoj, aliĝu kiel membro. La kotizo estas memvola.

Sed por ĉiu speco de batalo aŭ luktado necesas mono kaj ankaŭ por ĉi tiu paca luktado.

Do aliĝu kaj skribu al Waldemar Quaiser, Wien, XVIII., Julienstr. 40, oberes Haus.

Eksporto de varoj el Aŭstrio pere de Esperanto.

Mi deziras grandstile peri la eksporton de aŭstriaj altkvalitaj varoj, sed mi ankaŭ peros la importon.

Vi komercistoj, informu min pri la artikloj, kiujn vi bezonas el nia lando, kaj mi tuj respondos je via kontenteco. Sed nekomercistoj instigu viajn konatajn komercistojn al tia negocado kaj vi ricevos procentaĵon de maklero.

En la venonta numero AE publikigos artiklojn, speciale rekomendindajn. Sed jam nun mi atendas viajn demandojn

Arthur Schidloff, Wien, II., Kl. Mohrengasse 4, Aŭstrio.

Estas unu el la taskoj de nia Esperanto-Varbadservo helpi en la intereso de nia patrujo la eksporton de varoj. Ni nur povas rekomendi nian s-anon Schidloff, jam de 1911 registrita firmo en Wien, kiel seriozan kaj spertan komerciston.

E.-Varbadservo p. Aŭstrio.

XXIX-a Jubilea.

La Prezidanto de Pola Respubliko Prof. d-ro Ignacy Moschicki akceptis la Altan Patronadon de 29-a.

Adreso: Warszawa, Chmielna 28 m 8.

Aŭstria E.-Asocio aranĝos **karavanon.** Kelkaj s-anoj jam aliĝis. Eksterlandanoj, trapasontaj Aŭstrion, povos aliĝi de Wien kaj ĝui la rabatojn.

Kongreskotizoj:

1. membro	aŭ ŝ	46.60
2. familiano	aŭ ŝ	29.30
3. gejunuloj ĝis 18-jaraj	aŭ ŝ	18.70
4. helpkongresanoj	aŭ ŝ	18.70

Frupagantoj (1—3) ĝis **30. aprilo 20%** rabaton.

INFORMOJ EL AŬSTRIO

Represo kaj traduko deziratajBonvolu sendi pruvekzempleron!

Aŭtoŝoseo Roma—Berlin konstruota. La itala senatoro inĝ. Puricelli prezentis al kanceliero d-ro Schuschnigg la planon de granda rekta aŭtostrato Roma—Berlin, kies aŭstria parto forte interesis la kancelieron.

Morto de Robert Krenn. La konata verkisto Robert Krenn mortis en Wien 66-jara. Li verkis multajn Vienajn kantojn, kupletojn, kanzonojn kaj teatraĵojn, prezentatajn en Aŭstrio kaj eksterlande kun granda sukceso.

Novaj trovoj de nafto en Aŭstrio. La produktiveco de l' jus konstruita sondo „Gösting VII" en Zistersdorf kreskis de komence 21 vagonoj ĝis 32 po 10 t ĉiutage. Kune kun la aliaj minejoj oni nun ekspluatas ĉiutage 38 vagonojn da altvalora krud-oleo.

La agado de **„Wiener Freiwillige Rettungsgesellschaft".** „Viena Societo Libervola por unua helpo" donis dum la pasinta jaro en 25.987 kazoj, do mezmezure 71-foje ĉiutage, unuan kuracistan helpon. Tri kvinonoj de la kazoj koncernis vundiĝojn, la ceteraj malsaniĝojn, ĉe 15.028 elveturoj la aŭtomobiloj faris 140.000 km.

La konstruktiva agado de komunumo Wien en filmo. Laŭ iniciato de urbestro Schmitz, sub direktado de d-ro Prodawka de Federacia Film-oficejo kaj de vicdir. Denk de Gewista estis jus fabrikita sonfilmo, donanta impresan superrigardon pri la grandstila labor-haviga programo, efektivigita de Komunumo Wien en 1934, 1935 kaj 1936.

Radio Wien.

Ĉiun lundon de 15 h 40 — 16 h Esp.-kurso 12. III. „Porpatrina Helpverko de Patriota Fronto" de Konsilisto de Urbo Wien **Minna Wolfring,** 22 h 20.

19. III. „Esperanto-hejmo en Aŭstrio" de **Maria Letfuhs,** 22 h 20.

10. IV. „Jubileo de Aŭstria Skoltmovado" de **Hugo Jakob,** 22 h 20.

Paska kutimo en Tirol.

Originala artikolo por AE de **inĝ. E. H. Jordan,** „Bundeskommissariat für Heimatdienst" en Federacia Kancelierejo.

Dimanĉe antaŭ (Pasko (Palmo-festo) okazas je memoro al la eniro de Kristo en Jerusalemo la benado de la salikamentaj vergoj. Ĉi tiu festo estas solenata ĉiuloke en Aŭstrio en diversa maniero, sed en la alpo-landoj per specialaj kutimoj. Dume en Mühlviertel en Oberösterreich salikamentaj vergaĵoj, binditaj sur stangoj, estas portataj de la vilaĝgejunularo en longa procesio en la preĝejon, oni ligas en Tirol la branĉetojn sur la pintoj de la stangoj je fasko kaj ornamas tiun per interplektitaj rubandoj, floroj, bakaĵoj, pomoj kaj aliaj dediĉitaj donoj. Post la eklezia benado la brancoj estas disdonataj en la domo kaj sur la kampoj kaj gardu la posedaĵon de la kamparano kontraŭ malfeliĉo kaj miskreskado. La bakaĵo kaj pomoj estas disdonataj inter la malriĉuloj en la vilaĝo.

Fremdenverkehrstelle de Urbo Wien.

Wien VII., Mariahilferstraße 2

Jus aperis la programo de la aranĝoj de februaro ĝis junio 1937.

Ĝi eldonas en majo **Festkartojn,** uzeblajn por la **Festsemajnoj** (6. ĝis 20. junio), kiuj rajtigas al senviza envojaĝo, 60% rabato por la fervojreveturado post 5-taga restado en Wien, rabatoj sur kablofervojo al Rax, dentradfervojo Schneeberg, por la Vienaj rondveturadoj, teatroj kaj koncertoj kaj sur la vaporŝipoj sur Danubo.

La programo por la Festsemajnoj estas grandioza, detalojn de supra adreso.

Aro da **ekspozicioj,** inter ili: „Internacia hundoj ĉiurasaj" 3. kaj 4. aprilo. Printempa de „Societo de verkantaj artistoj" (majo ĝis julio); „Albrecht-Dürer-Bund" (1. ĝis 21. marto) ktp.

EL LA MONDO

Argentinio. „Internacia", nova gazeto, organo de E.-societo de Rosario. 16-paĝa, hispanlingve, bele ekipita. Adr.: 9 de julio 3301, Rosario.

Hungarujo. Hungara Ĝenerala Kreditbanko, Budapest, V., Jozsef-ter 2, dissendas propagandilon en E.

Japanujo. „La Fervojisto", organo de Japana E.-Ligo Fervojista, publikigas „Terminaron de Fervojaj Veturiloj" en japana kaj E.-lingvoj.

Aŭstr. Esp. 1937, marto

„Aŭstria Antologio de la 20-a jarcento.“ La unua volumo baldaŭ eliros. Prezo kun afranko 4 rpk. Antaŭmendintoj kaj pagintoj de ĉiuj 6 volumoj ricevos belan kovrilon por la tuta verko! **Mendu tuj!**

„Tra Aŭstrio per aŭtobuso“, vojaĝlibro, 80-paĝa, tra la plej belaj partoj de Aŭstrio kun 70 bildoj, nur 3 resp. kup.

„Somera Universitato,
Internacia Konferenco de Instruistoj,
Internacia Konferenco de Virinoj,
dum la 28-a Univ. Kongreso en Wien 1936“ jus aperis en 64 paĝoj, 23.5×15.5 cm, kun 18 paroladoj kaj 4 rezolucioj de s-anoj el 11 landoj. Prezo kun afranko aŭ ŝ 3.— aŭ 5 int. poŝt-resp. kup. **Nur malgranda stoko!** Tre **grava** por varbado al Pentekosta Konferenco en Paris!

„Albumo de Wien“, bele bindita kun pli ol 100 bildoj kun klariga E.-teksto, nur 5 resp. kup.

NOVAJ PUBLIKIGAĴOJ

XII-a Somera Universitato.

konferenco de instruistoj, konferenco de virinoj dum XXVIII a Universala kongreso de Esperanto en Wien, Aŭg. 1936, kompilita de kortega kons. Hugo Steiner, Int. Esp. Muzeo, Wien 1937, Albrecht-Dürer-Verlag, Wien; prezo kun afr. ŝ 3.— (5 int. resp. k.). Estas tre dankinde, ke la aranĝinto de la kongreso savis el forgesado la tre gravajn raportojn kaj paroladojn. Kiuj persone aŭdis, certe relegos ilin tre volonte. Krome ja ne ĉiuj kongresanoj havis la emon aŭ tempon ĉeesti ĉiam kaj ĉie kaj precipe ja nur malmultaj samideanoj havas la feliĉon, ke ili persone povas partopreni la mondkongresojn, sed ili tamen volas scii iom pri la gravaj okazintaĵoj tie. Nun en tiu ĉi certe ne multekosta libro ili povas legi originalajn tekstojn. Oni nur povus bedaŭri, ke la kolekto ne enhavas la tre interesan raporton de s-ro Borel pri la enketo de la Lyona grupo al la parlamentanoj kaj senatanoj de Francujo en Julio de pasinta jaro. D-ro Christanell.

Esperanto-Schlüssel, 4. Auflage, 16. bis 20. Tausend, 1937. Albrecht-Dürer-Verlag, Wien. — prezo 10 g. La forvendo de 15.000 ekzempleroj dum malpli ol unu jaro jam montras sufiĉe, ke la libreto estas tre ŝatata kaj bezonata. Do ĝi vere ne bezonas rekomendon. En nova eldono oni forigu la preseraron p. 10 abici' anstataŭ ambici'! D-ro Christanell

Kleines Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto, enthaltend über 3500 der wichtigsten deutschen Stichwörter mit Uebersetzung aus dem offiziellen Wortschatze des Esperanto von Dr. Emil Pfeffer. 1. bis 5. Tausend. Albrecht-Dürer-Verlag, Wien. Ĝis nun ne ekzistis tiel malgranda kaj tiom malmultekosta germanesperanta vortareto, do oni povas esti tre scivolema pri la farotaj spertoj. Sed tion oni jam povas diri, ke la aŭspicioj estas plej bonaj, ĉar la elekto de la plej bezonataj vortoj estas farita kun granda lerteco. La esperantaj vortoj estas generale tre lidindaj, ĉe plursencaj germanaj vortoj estas la distingo ofte tre klare notita. Malfonge la enhavo estas pli riĉa kaj akurata, ol mi kuraĝis esperi. La vortoj facile kaj rapide troveblaj, la preso klara kaj korekta. Post longa serĉado mi fine trovis negravan preseraron (feilich — freilich). Do mi opinias, ke tiu ĉi nur 10-groŝa vortareto baldaŭ estos tre ŝatata helpilo por multaj samideanoj.

D-ro Christanell

Petrolo. Romano de Upton Sinclair. Tradukita en Esperanton de William Bailey. Popularа Esperantobiblioteko n-ro 11. 1936, The Esperanto Publishing Co., Ltd., London. Du volumoj, kune 626 paĝoj. Prezo 3 ŝ, 6 p., afranko 6 p. po volumo.

La apero de tiu ĉi fama libro en E.-traduko estas denova pruvo por la seriozeco de kaj ĝia kreskanta utileco por la diskonigado de la mondliteraturo.

La romano, kiu traktas la plej aktualan problemon de la nuntempo, la rilatojn inter kapitalismo kaj laboristaro, estas jam tiel konata per la originalo kaj nacilingvaj tradukoj, ke supozeble sufiĉas karakterizi ĝian enhavon per malmultaj frazoj. La romano priskribas la evoluon de la filo de riĉega Kalifornia petrolindustriisto. Bunny Ross, junulo sinceranima, impresiĝema kaj kunsentema, malemas al la ekspluatmetodoj de la grandindustriistoj, kaj malgraŭ la avertoj de siaj familianoj kaj samsocietanoj li simpatias kun la ekorganiziĝanta laborista movado, malfeliĉe ŝanceliĝante inter iliaj du partoj: la socialdemokratoj kaj la komunistoj. La mondmilito progresigas la sociajn demandojn, sed ne solvas ilin, Laboristoamiko el junaĝo, militservinte en la Usona gvardio en Siberio, revenas hejmen kiel komunisto. Li estas mortigita dum atako de politikaj kontraŭuloj. Bunny, al kiu post la morto de lia patro restas nur relative malgranda heredaĵo, fine decidas, post naŭziĝo de la mondo de kapitalistoj kaj mondulinoj, sin dediĉi al la paca edukado de laboristoj kaj tiucele fondas modelbienon, mem edziĝante kun socialista judino.

Kia ajn estas la politika kredo de la leganto, li ne povas esti ne interesita je tiu ĉi libro. De literatura vidpunkto eble estas plej rimarkinde, ke al la aŭtoro bone sukcesis prezenti la intence traktitajn sociajn problemojn en formo de individua sorto kaj tiel peri al la leganto la instruan efikon de reala travivaĵo.

Pli priparolinda ol la enhavo ŝajnas al ni la E.-traduko. Ĉar la grandaj literaturaĵoj gravuras la trajtojn de nia lingvo kaj presitaj lingvoeraroj facile fiksiĝas.

La stilo de la traduko estas kvankam ne eleganta, tamen sufiĉe klara, flua kaj ne riproĉinda. Gramatikaj eraroj ne troviĝas, nur la ripetita uzo de „esceptinte“ anstataŭ „escepte de“ ĝenas la ŝatanton de korekta lingvo.

Pli kritikinda estas la uzo de multaj (vere ne necesaj) neologismoj. Kvankam ili iomete perdiĝas en la granda amplekso de la verko, ili tamen ĝenas la cetere bonan kompreneblecon. Oni povas ilin dividi en du grupojn:

1e: vortoj troveblaj en la Plena Vortaro, sed ne oficialaj kaj certe ne internacie komprenebla: ekz.: bilo, blago, ĉantaĝi, defin, fusilo, gagate, hurdo, lozanĝo[1]), lubrika, obuso, villo (anst. vilao);

2e: vortoj eĉ ne troveblaj en la Plena Vortaro: bangalo, destrojeroj, futbalo[2]), halukso, kamuflaĵo, miraĝo, plasi, razenejo.

Nur du rimarkigoj: 1) „Lozanĝo“ en la Plena Vortaro havas la saman difinon kiel „rombo“. Kial do ĝi estas enkondukita? 2) „Futbalo“ estas en E. ne permesebla formo, ĉar „futo“ jam signifas mezuron kaj „balo“ dancfeston. Ĉu la esperantistoj estas vere tiel senspiritaj, ke ili ne povas kompreni „piedpilko“?

La facilanima enkonduko de neologismoj estas granda danĝero al la natura evoluo de nia lingvo, kiu devus atenti antaŭ ĉio sian propran logikon. Kia ja fariĝus la lingvo, se ĉiu rajtus enkonduki iujn novajn vortojn el sia lingvo kaj tiuj ĉi tuj poste enpreniĝus en la vortarojn? Kiu nepre volas uzi novajn vortojn, tiu antaŭe aŭskultu la kritikon de bona alinacia esperantisto! Kaj rajta postulo: Ĉiu nova vorto estu en aldono klarigita.

Tiam verkoj kiel la priparolita pli facile populariĝos kaj gajnos inter la esperantistaro la merititan disvastiĝon kaj rekonon.

E. W.

Anoncoj.

Anoncoj havas plej bonan efikon, ĉar la gazeto eliras al 122 Landoj; 2-linia ŝ 2.—, ĉiu plua linio ŝ 1.—.

„La Pacifiko.“

Mi mem eldonas, mem presas, kompostas, redaktas la ilustritan 16—20 paĝan revuon (dume periodan), pure en E. pri Aŭstralazio kaj Pacifika Oceano. Helpu per abono 12 angl. ŝ por 12 numeroj aŭ 4 poŝtresp. kup. po numero: Rusa pastro, aŭtoro de libro „Siberio“ Inocento Serišev, C. P. O. Box 2988 NN, Sydney, Aŭstralio.

Kontraŭ 2 poŝtresp. k. Brazila Ligo Esp. Av. Marechal Floriano, 212 Rio de Janeiro sendos la 3 Esp.-pm. en fermita letero; kontraŭ 4 rpk. vi ricevos en enskribita letero la 3 pm. en la koverto kaj same sur la koverto.

Sendu ilustritan poŝtkarton mendante senpage belan **memorigan poŝtmarkon** brazilan kun **Esp.-teksto.** Ĝi utilos al via propagando kaj al tiu de ni brazilaj samideanoj. Adresu al s-ro Ismael Gomes Braga, Rua José Vicente 70, Andarahy, Rio de Janeiro, Brazilio.

Universala Esp.-Steno. Korespondanta Universitato komencas Steno-kurson korespondan senpage (3 lecionojn). Por la afranko sendu 20 purajn foliojn al Radoslavov, Zlatarica, Bulgarujo.

Edziĝ-anonco. Stjepan Mišak, Adana, Turkujo, 52-jara, kristano, sana, malriĉa, bonkora serĉas bonkoran tajlorinon, kuiristinon modestan kun iom da mono por geedziĝo. Esp-ino skribu detale, indiku aĝon, posedantan sumon, parolatan lingvon propramane. Foton aldonu.

Heroldo de Esperanto

ankaŭ nun aperas nepre regule, eĉ en plibonigita formo, — ĉar ni fidas, ke jam baldaŭ **revenos pli bonaj tempoj.** Petu senpagan specimenon de la eldonejo

Heroldo de Esperanto

Scheveningen (Nederl.), Harstenhoeckweg 223.

Esperantistoj!

Vi ofte esprimis la deziron havi sendependan organon, liberan por ĉiuj. **Tia organo estas**

la plej malkara el ĉiuj esperantaj gazetoj

Nia Gazeto

monata, grandformata, ok-paĝa, ilustrita, internacia revuo.

Direktoro: **Georges Avril.**

Prezo de abono: 3 svisaj frankoj por 12 numeroj, nur antaŭpage.

Redakcio kaj Administracio:

ĉe **„L'Eclaireur“,** 29, avenue de la Victoire, **Nice,** Francujo.

Literatura Mondo, Budapest, IX., Saroksári ut 38—40 V 6.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner. Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 28.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist"

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des Oesterreichischen Esperanto-Bundes

Nr. 3 (18) März 1937

Für Oesterreich jährlich mit Postzusendung, nur zu fünf Stück, S 2.50 in Briefmarken. — Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-12.826

La internacia helplingvo.

De **Adam Zamenhof**, Warszawa

Neniu dubas, ke lingvo internacia estas oportuna, sed ne ĉiuj ankoraŭ estas konvinkitaj, ke ĝi estas necesa por normalaj internaciaj rilatoj. Jam de longa tempo oni akceptis kiel aferon tute naturan, ke la muziknotoj, la telegrafaj kaj turismaj signoj estu internaciaj. Oni aranĝis internaciajn kongresojn por sciencoj kaj sportoj, oni veturas per internaciaj vagonoj kaj jam trapasante la doganlimon oni konstatas, ke eĉ la simpla interkompreniĝo kun la fremda doganoficisto ne ĉiam estas facila. Kaj kiel aspektas la kompreno de prelegoj en internaciaj sciencaj kongresoj, se oni ne scias perfekte almenaŭ tri lingvojn! Eble pro tio la internaciaj sportaranĝoj havas ordinare pli grandan sukceson ol la sciencaj.

La lingvo internacia devas esti neŭtrala, ĉar nur tiamaniere ĉiuj popoloj povos sin senti egalrajtaj. Oni do ĉiam sentas sin genita kaj eĉ malplivalora, kiam oni devas interparoli en ia nacia lingvo en fremda lando, kie tre ofte la stratpurigisto aŭ gazetvendisto, kiun ni demandas pri la vojo, pli bone parolas ol ni.

La lingvo internacia devas esti facile lernebla, kaj tia sendube estas Esperanto. Partopreninte en multaj esperantaj kongresoj internaciaj mi povis konstati, ke tre ofte personoj, kiuj depost nelonge komencis lerni Esperanton kaj en la unuaj tagoj de kongreso ankoraŭ ne kapablis flue paroli, jam post kelkaj tagoj faris tian progreson, ke la interparolado kun ili prezentis jam nenian malfacilaĵon. Kaj okazadis multfoje, ke la personoj, kiuj komence aspektis kiel tre timemaj kaj modestaj balbutantoj, post kelkaj tagoj de parola praktika ekzerco aperadis en alia lumo, kiel tre spritaj kaj instruitaj homoj!

Die internationale Hilfssprache.

Niemand zweifelt daran, daß eine internationale Sprache zweckdienlich ist, aber noch nicht alle sind davon überzeugt, daß sie für die normalen, internationalen Beziehungen notwendig ist. Schon seit langer Zeit nahm man es als eine ganz natürliche Angelegenheit hin, daß die Musiknoten, die Telegraphen- und Verkehrszeichen international sein sollen. Man veranstaltet internationale Kongresse für Wissenschaft und Sport, man reist in internationalem Waggon und schon beim Ueberschreiten der Zollgrenzen stellt man fest, daß sogar die einfache Verständigung mit dem fremden Zollbeamten nicht immer leicht ist. Und wie sieht es mit dem Verstehen von Vorträgen bei internationalen wissenschaftlichen Kongressen aus, wenn man nicht wenigstens 3 Sprachen perfekt kann! Vielleicht haben die internationalen Sportveranstaltungen deshalb einen größeren Erfolg als die wissenschaftlichen.

Die internationale Sprache muß neutral sein, denn nur so werden sich alle Völker gleichberechtigt fühlen können. Man fühlt sich doch immer beeinträchtigt und sogar weniger wert, wenn man in irgendeiner nationalen Sprache in fremdem Lande sprechen muß, wo sehr oft der Straßenreiniger oder der Zeitungsverkäufer, den wir um den Weg fragen, besser spricht als wir.

Die internationale Sprache muß leicht erlernbar sein und solcherart ist zweifellos Esperanto. Als Teilnehmer an vielen internationalen Esperanto-Kongressen konnte ich feststellen, daß sehr oft Personen, die vor kurzem anfingen, Esperanto zu lernen und an den ersten Tagen des Kongresses noch nicht fähig waren, fließend zu sprechen, schon nach wenigen Tagen solchen Fortschritt machten, daß das Sprechen mit ihnen keinerlei Schwie-

En kelkaj landoj kreskas dum la lastaj tempoj la tendencoj kontraŭbatali ĉiujn internaciajn movadojn, kiuj eble povus malhelpi la disvolviĝon de pure naciaj kvalitoj de tiu aŭ alia popolo. Sed ankaŭ por tiuj, kiuj pensas tiamaniere, la enkonduko universala de Esperanto devus esti la plej bona solvo, ĉar tiu, kiu krom sia lingvo gepatra lernas kaj parolas nur Esperanton, estas plej malmulte influata de specifa kulturo de aliaj popoloj kaj lernas nur tion, kio estas pure homa. Kaj homoj ni ja ĉiuj estas kaj ĉiu filozofia aŭ socia teorio, kiu pri tio ne atentas, estos ĉiam ne reala kaj praktike ne valora.

Tre šatata s-ro Steiner!

Ni diligente lernas laŭ via radiokurso kaj sendas korajn salutojn al vi kaj al ĉiuj membroj de AEA.

F. Egger, L. Dren, H. Pflügl,
en Steinakirchen am Forst.

rigkeit bot. Und es geschah oftmals, daß Personen, die anfangs wie sehr furchtsame und bescheidene Stotterer aussahen, nach einigen Tagen praktischer Sprechübung in anderem Lichte erschienen, als sehr geistreiche und gebildete Menschen.

In einigen Ländern wachsen in der letzten Zeit die Bestrebungen, alle internationalen Bewegungen zu bekämpfen, die vielleicht die Entwicklung rein nationaler Eigenschaften des einen oder anderen Volkes hindern könnten. Aber auch für jene, die so denken, müßte die allgemeine Einführung des Esperanto die beste Lösung sein, denn derjenige, der außer seiner Muttersprache nur Esperanto lernt und spricht, ist am wenigsten beeinflußt von der spezifischen Kultur anderer Völker und lernt nur das, was rein menschlich ist. Und Menschen sind wir ja alle und jede philosophische und soziale Theorie, die das nicht beachtet, wird immer unwirklich und praktisch nicht wertvoll sein.

Esperanto-Pfadfinder. Das Pfadfinder-Hauptquartier in London ernannte Miß Zerkle, Lehrerin in Topeka, zur Vertreterin der Pfadfinderinnen für Amerika. Rev. John H. Fazel ist das Haupt der Pfadfinder-Esperanto-Liga, wohnhaft ebenfalls in Topeka.

Romane in verschiedenen Ländern.

Die norwegische Esperanto-Zeitung charakterisiert in ihrer Oktober-Nummer die Romane verschiedener Nationen: Im **deutschen** Roman wollen sich zwei Menschen im ersten Kapitel „kriegen" und erreichen dies im letzten; im **französischen** kriegen sich die Beteiligten schon im ersten Kapitel und trachten bis zum Schluß wieder auseinanderzukommen; im **schwedischen** lieben sie sich bereits im ersten Kapitel und kommen im letzten darauf, daß dies eine Täuschung war; im **englischen** wagen sie nicht, einander im ersten Kapitel zu lieben, und haben nicht den Mut, im letzten auseinanderzugehen; im **amerikanischen** gehen im ersten Kapitel zwei Menschen auseinander und verheiraten sich nach mehreren absolvierten Ehen im letzten wieder.

Niederland. In der niederländischen Presse sind 1935 in 142 Zeitungen 2300 Esperanto-Artikel erschienen.

Tschechoslowakei. An der Deutschen Technischen Hochschule in Prag finden Kursübungen in Esperanto statt, an welchen auch Nichtakademiker teilnehmen können.

Tschechoslowakei. In der staatlichen Gewerbeschule in Mährisch-Ostrau wurde Esperanto-Unterricht eingeführt, welchen Prof. Ing. Krajc leitet.

Ungarn. Die Ungarisch-Italienische Bank in Budapest (samt ihren 20 Filialen) hat für Korrespondenz und Bankdienst Esperanto eingeführt.

Invest-prunto aŭstria 1937.

La aŭstria registaro eldonas „Invest-pruntpaperojn" je 100, 500 kaj 1000 ŝ. Vi nur pagos 90 po 100 ŝ kaj ricevos, 4½% je rentumoj.

Fintago de mendo la 15. de marto 1937.

La enpagota mono servu por havigi al multaj miloj da aŭstrianoj laboron.

Ĉiu aŭstriano (ankaŭ amikoj de Aŭstrio povos partopreni) donu sian parton!

Koran dankon mi diras por la gratuloj, kiuj alvenis okaze de mia naskiĝtago. Mi ne povas ĉiun unuopan danki, do akceptu ie tiu vojo. Speciale ĝojigis min jena letero: „Kun ĝojo ni samideanoj en la pastroseminario ekprenas la okazon gratuli al vi ekkore okaze de via šatata naskiĝtago. Samtempe ni ankaŭ varme dankas al vi pro

via malegoista kaj modela laboro por nia bela ideo, kiun vi nun jam praktikadas dum pli ol 25 jaroj. La bona Dio riĉe rekompencu viajn klopodojn kaj penadojn! Geyrhofer, Wimmer, Daxberger, Hochreiner, Pachler, Haunschmid, Gürlinger, Breiteneder."

Gratulon al nia s-ano Gustav Schlerka okaze de lia 25-jara Jubileo kiel oficisto de Komunumo Wien.

AEA, Klubo-Wien, AE: Steiner.

Scherer en Aŭstrio.

Bedaŭrinde nia s-ano Scherer el Los Angeles ne povis resti pli longan tempon en Aŭstrio. Li alvenis la 13. de februaro el CSR. kaj faris du ege interesajn paroladojn pri „Mirinda Hollywood" kaj „100.000 km sen dogano, pasporto kaj valuto-malfacilajoj en propra loĝaŭto" kun vere belegaj bildoj. Interesige kaj ofte sprite Scherer parolis kaj rikoltis multan aplaŭdon. La paroladoj okazis en la festsalonego de „Domo de la gastmetiaj dungitoj" kaj ni danku al prezidento urbkonsilisto de Wien Bauer pro lia subteno kaj ankaŭ al „Kleines Blatt". La gazetaro raportis pri la paroladoj.

Sed Scherer ankaŭ parolis en Radio-Wien sur diskojn, kiuj estos poste disaŭdigataj. Kune kun kortega kons. Steiner de Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio s-ro Scherer vizitis Gazetarservon de Federacia Kancelierejo, kie Scherer informiĝis pri 1. Patriota Fronto kaj ties amplekso, 2. Stato de restarigo de monarhio en Aŭstrio. Scherer ankaŭ diris al la lin akceptinta sinjoro, ke Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio multon faras por nia lando kaj ke li vidis la gazeton Aŭstria Esperantisto ĉiutage ĉe la diversaj grupoj, kie li faris sian paroladon.

Scherer parolis en Esperanto la 14. febr. en Esperanto-Klubo en Wien kaj la 15. jam en Klagenfurt, kie la vigla grupo aranĝis paroladon en Popolalthernejo. La 16. Scherer jam parolis en Salzburg en Urania, ĉiam kun bona rezulto kaj granda aplaŭdo. En Salzburg s-ano Fötinger instigis la Scherer-paroladon.

Poste Scherer veturis al Svislando.

Ni ege dankas s-anon Scherer pro lia vizito, kiu plene sukcesis, kaj ni deziras lin baldaŭ revidi en nia mezo. AEA

Aŭstria Esperanto-Asocio,
Wien, I., Neue Burg.

Hauptversammlung der AEA
in Krems, 30. April bis 2. Mai 1937.

Anschrift: Reg.-Rat G. Kern, Krems an der Donau, Schillerstraße 20.

Vorläufige Tagesordnung:

1. Tätigkeitsberichte:
   a) des Vorsitzenden,
   b) des Schriftführers,
   c) des Säckelwartes.
2. Bericht der Rechnungsprüfer.
3. Neuwahl des Vorstandes.
4. Arbeitsprogramm für das neue Geschäftsjahr.
5. Allfälliges.

Anmeldungen und Einzahlung (grauer Erlagschein, Konto A 187.625, Gottfried Kern, Krems) unter deutlicher Angabe des Namens und Berufes. Anfragen stets Rückporto beilegen.

Kongreßbeitrag bis 10. April S 2.—, für Arbeitslose und Familienmitglieder S 1.—; Kinder bis 14 Jahre frei. Nach 10. April S 3.—, bzw. 1.50. Zusendung der Kongreßkarte sofort nach Einzahlung.

Zimmer sind schon für S 2.50 (einbettig) und geminsames Quartier für S 1.50 pro Nacht zu haben. Es ist aber nötig, daß Anmeldung bald erfolgt.

Es wird von Wien eine gemeinsame ermäßigte Fahrt mit Bahn nach Krems am 1. Mai früh und zurück mit Schiff am 2. Mai nachmittags veranstaltet. Anmeldungen an AEA, Wien, I., Neue Burg.

Da unser Kongreß in den Rahmen des Wachauer Frühlingsfestes eingereiht werden soll, so werden die Kongreßteilnehmer gegen Lösung des Festabzeichens von S 1.— besondere Fahrbegünstigungen genießen.

Hainfeld. E.-Societo „Al alta celo" elektis en sia ĝeneralkunveno jenan estraron: Prez. instr. Wandl; vicprez. Rosa Wimmer, kas. Mia Wandl, A. Schatzl; sekr. Ludmilla kaj Auguste Karbacher, bibliot. Helene Rambousek, Emmi Kreihansl; kontrol. Franz Kreihansl, Jos. Kissling; konsil. Gottl. Bilek, G. Gruber.

Linz. Pastra Seminario. Malgraŭ la plej granda kontraŭeco en nia komunumo nia malgranda verda frataro defendas sian ideon. El la biblioteko de E.-grupo Linz ni prunteprenas librojn. Vizitu nin, vi estos bonvena.

Alois Hochreiner, Priesterseminar.

Klagenfurt. E.-Asocio elektis en sia ĝeneralkunveno la 20. I. la malnovan straron: prez. ofic. Müller, vicprez. fakinstr. Schmid, Engler, Sloker; sekr. Komposch, kas. Schacherl, bibliot. Plasche, propagando Dürschmid. Komposch.

Salzburg. Esp.-grupo havis sian ĝeneralkunvenon la 3. III. Elektoj: Reelektita prez. prof. d-ro Christanell, vicprez. instr. Fötinger, kas. Noggler, sekr. prof. Scheierl, estraranoj Stegmüller, Thiel, Kern, Palfinger, Loczi, Elchlinger. F. Scheierl.

Salzburg: Scherer parolis tre interese, parte ankaŭ tre sprite pri „Romantika Hollywood" en Urania antaŭ 140 personoj. La bildoj ankaŭ tre plaĉis. La parolado estis grava sukceso. Fr. Scheirl, sekr.

Salzburg. „Estonteco" havis la 18. febr. sian ĝeneralkunvenon. Grupestro Maislinger

faris sian raporton kaj mallaŭdis la nesufiĉan aktivecon de kelkaj membroj: „Ni ne volas esti aajngrupo, ne bezonas maldiligentajn membrojn". Vere kuraĝa vorto, imitinda! (Red.) Novelektoj: prez. prof. d-ro Fr. Christanell; grupestro en la pastrodomo: Jos. Gassner; grupestro en Borromäum: Ant. Maislinger; bibliot.: M. Fink; konsil.: A. Oberaigner, Jos. Rettenbacher. Prez. Christanell parolis pri enkonduko de E.

Salzburg. „Salzburger Chronik" raportis pri Scherer — parolado en sufiĉe granda amplesko.

Schwaz en Tirol. Bone vizitata kurso, gvidata de d-ro Karner-Innsbruck. La grupo aranĝis bone vizititan Esperanto-renkontiĝon je karneval-dimanĉo, 100 pers. ĉeestis.

Telfs, Tirol. Kurso de s-ano Wulz finiĝas. La grupo bone funkcias.

Wien. Katolika Unuiĝo Esp-a. La 31. I. post sta. beno, celebrita de P. komandoro-parohestro G. Plank, okazis la ĝeneral-kunveno en ĉambrego de Schotten-monahejo. Prez. Chiba salutis inter la ĉeestintaj speciale Honorprezidanton P. Meŝtan el Krems kaj vicprez. de AEA kalk. kons. Frey, anstataŭanta prez. kort. kons. Steiner. Post laŭtlegado de la multaj salutleteroj el diversaj landoj prez. Chiba memoris la mortintajn membrojn Emmy von Kubin kaj Walter Smital kaj P. Poell en Gemert (Nederl.), kiu gvidis „Intern. peresper. Katolika Informejo-n" (IKI). Li raportis pri la bonaj aranĝoj de 18. Int. Kongr. de Katolikaj esp. en Brno kaj la aranĝoj dum la 28-a en Wien kaj pri translokiĝo en la novan hejmon. I., Ebendorferstraße 6 kaj dankis al la estro de Schotten-monahejo pro la multjara gastameco, al P. Msg. Schneider de Kath. Gesellenverein pro la disponigo de la kapelo por la monataj Diservoj, al sekr. Huber pro lia helpemo, al P. gvardiano de la P. Franciskanoj pro lia afabla sintenado, al ties ordenaj filoj P. Albert kaj Bruno, la fervoraj edifantaj E.-predikantoj, al kort. kons. Steiner kaj al la katolika gazetaro. — La ĉiama kas. dir. Schiebl prezentis la kasraporton. Jen la listo de elektitaj: Prez. Chiba, vicprez. kalk. kons. Siedl kaj baronino Scherpon, sekr. ge-Mudrak, kas. dir. Schiebl kaj s-ino Rusch, bibl. F. Zimmermann, kons.: ofickons. Gasperini kaj s-inoj Siedl kaj K. Mayrleb. — Sekvis aangoj de la statutoj konforma al la efektivigota aligo de KUE al „Katolika Agado" (Kath. Aktion). Jarkotizo denove ŝ 3.—. — Vicprez. Siedl proponis, servigi E-on al Eŭkaristika Kongreso 1938 en Budapest. P. Hebnstreit parolis pri „La respondeco de la katoliko al eklezio kaj ŝtato". S-ino Siedl alvokis al plifortigo de la katolika movado. P. Mestan memorigis pri la grava, signifoplena papa rekomendletero, siatempe direktita de papo Benedikto XVa al IKUE. — Post la oficiala parto prezentado de amuza parto: Sichart (korno), L. Chiba (fortepiano) esp.-kantoj de bar. Scherpon kaj K. Mayrleb.

Wien. E.-Soc. Danubio, VIII., Alserstraße 63 A, 15. 3. filmparolado de Jos. Blasch; 22.3. Parolata E.-gazeto. Komenco je la 20 h.

E.-Klub, I., Wallnerstraße 6 (en la vestiblo la unua pordo dekstre) ĉiun mardon de 18 h 30 — 21 h 30: Ekzerco, paroladoj, filmprezentadoj, amuzo, familia aero. Gastoj bonvenaj.

Internacia Esperanto-Ligo.
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) Anglujo. Ĉefdelegito por Aŭstrio: Gustav Weber, Wien, I., Neue Burg, Heldenplatz. Poŝtŝparkasso Nro: B 178935.

Novaj membroj:

Ebensee: Fried. Weißkirchner, dentisto (del).
Eggenberg bei Graz: Gottfr. Schwarz.
Gmünd I: Hugo Waldhauser, libroten. (del)
Krems: Gottfr. Kern, reg. kons.
Mödling: Dro Ant. Casari, prof. (del) D-ro H. Scheibelberger, lern. insp.
Riedau: Fino F. Willlingseder (del).
Ried i. Innkr.: J. Hellwagner, komerc. (del).
Sigmundsherberg: Ed. Bauer, ferv. ofic. (del) Karl Wolf, direktoro.
Steyr: Firo Christ. Kaspar, oficistino. E. Tillian, oficistino (viodel).
Wasenbruck: Franz Waldhör.
Wr. Neustadt: Gustav Schmid, ofic. (del)

En multaj lokoj de Aŭstrio ne ankoraŭ estas delegitoj. La tieaj samideanoj tuj aliĝu kaj per tio publikigu sian loĝlokon pere de nia jarlibro en la tuta mondo!

Mortis

nia longjara s-ano ĉefprokuristo **Rudolf Dostal**, Wien, en sia 68. vivjaro;

la **patrino** de nia fervora s-anino **Grete Kellermann**;

s-ano **Franz Holbauer** en Gföhl.

Al la parencoj nian koran kunsenton!

Rudi Max Frey, nia plej juna samideano, nur 11-jara, la filo de la vic-prez. de AEA kalkulkons. R. M. Frey. Je sia 6-a naskiĝtago li fariĝis esperantisto. Al la gepatroj korajn kondolencojn.

Frl. Fiedler Maria, XIII., Hadikgasse 122 (Tel. A-56-4-79) gibt Klavier- und Englischstunden. (Membro de nia E.-klubo. Red.)

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.